


Numero: 327.
Aŭgusto 2019.

27-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Aŭgusta sunbrilo

Aŭgusto iomete estas malgaja por mi. Mi ne scias, kial. Eble pro la proksimiĝanta aŭtuno kaj la forpaso de la somero.

Nun, kiam mi skribas ĉi tiujn frazojn, en mian koron ennestiĝis amara tristeco.

Tiel estas ĉiufoje, se la kalendaro montras ĉi tiun monaton.

Kvankam ankoraŭ la suno brilas varmege, eĉ tro. Ĉi tiu somero estas terure varma. Onidire pro la tuttera varmiĝo.

Ni homoj estas malbonaj mastroj, ni ne atentis pri nia terglobo. Ni pereigos ĝin, se ni ne ĉesas rabomastrumadon kaj ni ne ellernos vivi pli bone.

La riveroj, lagoj, maroj kaj la oceanoj estas plenpenaj de plastaĵoj. Tunoj da plastaj boteloj flosas sur la oceanoj kaŭzante grandan domaĝon al la faŭno kaj kompreneble ankaŭ al ni homoj.

Estus bone vivi en pli bela mondo, kie ĉio estas paca kaj harmonia.

Mi ne scias, ĉu tio ĉi iam povos realiĝi.

Eble la nuna varmeĝo pligrandiĝos kaj nia planedo Tero iĝos mem la infero. Ni ĉiuj pereigos kaj ĉio forbrulos. Tero estos ardanta globo kaj nenio restos el nia kulturo.

Eble ie en la fora galaksio, la tieaj estaĵoj diros unu al la alia: tie trans multaj lumjaroj estis planedo kaj ĝi pereigis pro la stulteco de la loĝantoj.

Mi ne deziras tian estonton por niaj idoj. Mi prefere rigardas nokte la ĉieloplenan firmamenton atendente la falstelojn, kiuj kuregas super mi.

Mi konas popoldiron: se oni ekvidas falstelon kaj tiam oni pensas pri io, tiam tio plenumiĝos.

Dum la tuta aŭgusto nokte, se mi rigardos supren al la ĉieloj, mi pensos, ke nia hejmo, Tero saviĝu kaj la homaro ankoraŭ ekzistu longtempe.

— Redaktanto —



Du babilantoj

Sub ombra, granda arbo du homoj babiladis. Ili estis mezaĝaj. Unu havis okulvitrojn kaj la kalva viro estis iom dika, sed ne tro.

— Lerni lingvojn estas necese. Se oni ne scias fremdajn lingvojn, tiam oni estas perdita.

— Min ne interesas la lingvolernado. Laŭ mi gepatra lingvo estas sufiĉa. Mi ne deziras komuniki kun eksterlandanoj.

— Ĉu vi ne lernis fremdan lingvon?

— Jes en la lernejo mi lernis la rusan lingvon, sed jam mi forgesis ĝin.

— La rusan lingvon oni devis lerni devigite.

— Prave. Eble tiam oni malŝatigis al mi la lingvolernadon.

— Plenaĝe vi povus elekti lingvon, kiu interesas vin. Krome, kiu lingvo estas utila por vi.

— Mi diris, min ne interesas la fremdaj lingvoj. Mi volas vojaĝi nek eksterlanden, mi volas komuniki nek kun fremduloj. Ili parolu la mian, se ili deziras paroli kun mi.

— Kредu min, lerni fremdajn lingvojn estas tre bona kaj utila. Se vi scias fremdajn lingvojn, antaŭ vi malfermiĝas pordoj kaj fenestroj al la mondo.

— Vi ne povas konvinki min. Mi ne deziras lerni fremdajn lingvojn.

— Se vi serĉas novan laboron vi povas dungiĝi pli facile, se vi parolas lingvojn. La grava fakliteraturo estas verkita en diversaj fremdaj lingvoj.

— Mi konsentas, sed tial estas la tradukistoj kaj interpretistoj por ke ili helpu al ni. Ekzistas multegaj lingvoj, kiun mi lernu?

— Malfacila demando. Ĉefe ellernu la anglan. Ĝi estas disvastiĝinta en la tuta mondo. Poste lernu germane, hispane, france, portugale, arabe, ĉine. Refreŝigu vian rusan lingvoscion...

— Homo, ĉu vi stultiĝis? Kiom da lingvoj. Mi jam estas kvardekjara. Ne forgesu, oni havas nur unu vivon!

— Jes, oni havas nur unu vivon, tamen oni devas lerni fremdajn lingvojn. Ne hezitu, jam hodiaŭ eklernu iun fremdan lingvon!

La okulvitra viro ekĝemas:

— Almenaŭ ekzistus universala lingvo, kiun oni parolas kaj uzas sur la tuta terglobo! Tiam eble...

— Ŝaŝa —



MORAL- INSTRUA RAKONTO

KIAM MI MALJUNIĜAS

Estis iam kaduka virino. Kiam sia edzo mortis, ŝi decidis, ke ŝi plu loĝu kun familio de sia filo. Tiu familio estis malgranda: ŝia filo, la edzino kaj ilia knabino. La knabino estas ĉarma kaj servema.

Ĉiutage ne nur ŝia vidkapablo, sed ankaŭ ŝia aŭdkapablo ŝanĝiĝis, sed je malbono.

Iam ŝiaj manoj estis tiom tremantaj, ke ĉio kion ŝi tenis en la manoj falis surplanken.

Eĉ panerojn faladis el ŝia buŝo surplanken. Al la familio de ŝia filo iomete ĝenis tia malordo.

Iun tagon dum tagmanĝo la povra avinjo ellasis supon sur la plankon.

Tiam ŝia filo kaj lia edzino decidis translokigi ŝin en la dometan koridoron.

Ŝi sidis tute sola en la domangulo en mallarĝa koridoro. Ŝiaj okuloj plenis de larmoj pro soleco. Ŝi sidis tie malgaje kaŝe ĵetanta rigardon al ilia tablo.

Kompreneble ankaŭ tie ŝi faris malordon, sed ŝi ne povis alien pro malbona sia sanstato. Vane kriaĉis riproĉanta al ŝi la edzino de ŝia filo. Tagoj pasis.

Iun vesperon la ĉarma knabineto ludis per kubeto, kiam ŝia patro demandis ŝin:

— Kara filino, kion vi faras?

La knabino respondis.

— Mi faras tableton por mi — Ŝi aldonis gaje — Tiamaniere vi kaj panjeto havos pacon kaj puran manĝejon. Kompreneble, kiam mi maljuniĝas.

La patro kaj la panjo eksilentigis. Poste la patro karesante la knabinon laŭte diris:

— Vi pravas, kara mia filino. Ni estis malĝentilaj al via kaduka avinjo — li turniĝis al lia patrino — pardonu nin, kara panjo! Venu ĉe ni, ni kune vespermanĝos!

Trarakontis MIRIĈ JADRANKA-ZAJEĈAR-SERBIO AŬGUSTO 2019



La rolo de literaturo en la ĉiutaga vivo

Ni vivas en la dudekunia jarcento kaj ĉirkaŭ ni ĉio ege plirapidiĝis.

Dum kelkaj horoj oni povas ĉirkaŭflugi la terglobon. Malaperis la distanco.

Ĉu ankoraŭ oni bezonas belajn, valorajn literaturaĵojn? Ĉu ankoraŭ oni legas librojn en la epoko de interreto? La homoj prefere fingrumas sian poŝtelefonon aŭ tabulokomputilon, ol preni en mano libron kaj legi.

Surstrate oni ofte vidas ulojn kaj ulinojn rigardante la ekranon de sia poŝtelefono ne atentante pri la ĉirkaŭa mondo.

Mi timas, ni homoj denove elektis malĝustan vojon. Ni fariĝos zombioj kaj ni forgesos pensadi. Ni forgesos la homan parolon, kiu kunligas niajn korojn kaj donas al ni majestajn pensojn.

La unusola elirvojo estas la rekono de la valoraj literaturaĵoj, kaj denove legi romanojn, novelojn kaj versojn.

Espereble la libroj povos rekonduki nin al la normala vivo.

Do, ne hontu preni libron en viajn manojn kaj denove trovu la belecon kaj la plezuron en la literaturaĵoj.

Nun komenciĝis malfacila konkurso. Se oni forĵetas la literaturon kaj vi pensas, ke super ĝi forflugis la tempo, tiam la homaro enpaŝos teruran epokon, kie oni baras sian fantazion, kiu helpis transvivi ĉiujn malfacilajn jardekojn. La fantazio kaj la pensado, kiujn instigis ĉiufoje donis esperon kaj forton.

Mi tre esperas, la literaturo paralele kun la teknikaj mirakloj de nia vivo trovos la komunan vojon kaj ili alportos por ni pli belan estonton.

— Apáti Kovács Béla —



POEZIO

Al la amikoj

de Wiktor Elski

aperis en *Unuaj agordoj*, paĝoj 9-10

Al agado, al laboro!
Kvankam ĉie malfavoro,
Kvankam homoj nin ne fidas,
Nek la celon nian vidas.

Al agado, al laboro
Kun kuraĝo en la koro!
Malgraŭ baroj sur la vojo,
Stel' espera nia ĝojo.

Jen ĝi lumas verda stelo,
Lumas hele sur ĉielo,
Ne permesas al ni plori,
Sed ordonas: plu labori!

Stelo lumas sur ĉielo,
Vojon montras ĝi al celo.
Nur persiste, nur konstante,
Pri la venko ne dubante.

Do ne dormu, sed leviĝu,
Koroj viaj ekflamiĝu
Kaj ekkriu per fervoro:
Fratoj, ĉiuj al laboro!



Ŝipo

de Eska

aperis en *Unuaj agordoj*, paĝoj 15-16

Sur blua maro ŝipo naĝas
Kun etendita velo...
Kien rapidi ĝi kuraĝas?
Sur blua maro ŝipo naĝas
Al malproksima celo.

Post si, ĝi larĝan sulkon sĝnas
Kaj naĝas kun maltimo,
Ĉar ŝipo ĉion jam rezignas,
Post si, ĝi largan sulkon signas,
Por ĝi ne estas limo.

Al land' ŝip' naĝas nekonata,
Ĝin batas ond' sovaĝe,
Per lerta mano kondukata,
Al land' ŝip' naĝas nekonata
Antaŭen kaj kuraĝe!

Ekblovis forta vento,
Nubigas jam ĉiel',
Kaj maron ĉirkalŭpremas
Subite la malhel'.

L' ondegoj batas ŝipon,
Rompiĝas blanka vel',
Sed ŝipo naĝas ĝiam
Al malproksima cel'.

Kun bru' la ondoj ŝaŭmas,
Kun tondra akompan',
Moviĝas jam ventego
Sur maro uragan'.

Venteg' ĝin ne timigas,
Nek forta uragan',
Ĉar rekte ĝin kondukas
La lerta, sperta man'...

Vane l' ondegoj batas ŝipon,
Vana ilia peno,
Montriĝas jam haveno!

Post longaj jaroj da naĝado,
Post vana, longa la serĉado
Ĝi fine venas celon.

Trankvila nune estas maro,
Sur voj' nenia staras baro,
Do ĝi volviĝas velon.

Por infanoj



FABLO (2019-07-29)

Kiu postvivos rakontos

Estis bela suna tago. Ja, vere estas tiel en la tagoj de post pluvegoj. Sur klara ĉielo videblas pendanta ĉielarko.

Sur la branĉon de maljuna Kverko alflugis Merlo.

– Kia beleco – ekpensis ĝi ekeksploranta.

Sube proksime de la granda maljuna Kverko kaŝita en herbejo serpentumis unu malsata danĝera Serpento serĉanta ion por tagmanĝi.

En la verda iomete malseka herbejo aŭdiĝas bela kantado. Vi povas diveni kiu estas la kantisto.

Kompreneble, tiu estas somera kantisto, kara Grilo..

Tuthazarde super ili flugis zigzage du bele koloritaj papilioj.

Iom for de ili pli proksime al arbarrando ligita por unu arbo troviĝis Azeno. Tium momenton surteriĝis Nizo.

– Bonan tagon al ĉiuj! – kriaĉe diris Nizo.

– Bonan tagon! – respondis

unuvoĉe ĉiuj bestoj troviĝantaj en la arbareto.

– Mi havas proponon. Aŭskultu min!

Ĉu ni fariĝu bonaj amikoj?

– Kial ne? – respondis ĉiuj unuvoĉe. – Do, se ni fariĝis amikoj, mi proponas ke ĉiuj elrakontu al ni unu rakonton pri si. Jen, mi

proponas. ke ni alvoku Azenon. kaj ĝi estu la unua rakontanto .

Dirite farite.

Jen nia Azeno venas pli proksimen kaj komencas rakonti

– Tium rakonteton eliauas al mi mia onklo Azeno la granda. Ĝi estis ravita de grila

ĉirpado. Ju pli ĝi aŭskutis la Grilon, des pli ĝi enviis al la grilo pro ĝia belvoĉa ĉirpado.

– Kion vi manĝas por havi tiel belan voĉon? – pridemandis la Azeno la grandan grilon.

– Vi devas manĝi nur roson - diris Grilo daŭrigante sian ĉirpadon.

De tiu tago mia onklo Azeno la granda manĝis nur roson, sed baldaŭ ĝi mortis pro malsato.

– Interesa rakonto – diris Merlo. Nun estas mia vico por rakonti la rakonton okazintan al miaj prauloj.

– Ĉiuj scias, ke mi bele kantas. Eble pli bele kantas Najtingalo. tamen multaj ĝuas mian kantadon. Mi vere matenmanĝas roson de pomofloro por ke mi havu tian belsonan voĉon.

Ĉiu scivole sidiĝis ĉiukaŭe kaj atente aŭskultis la rakonton de Merlo. Kiel la rakonto proksimiĝas je fino, Merlo rimarkis, ke Nizo alflugis sur branĉeton super ĝia kapo.

– Ho, tio estas danĝera pozicio por mi. Mi devas trompi Nizon se mi deziras postvivi – ekpensis Merlo .

La singaredma Merlo saltetis foje sur la branĉeto por pliproksimiĝi je la fino de la branĉeto. Iu minuton poste Merlo forte sin deĵetis de la branĉeto kiu ekflugis antaŭen ĝuste kie sidiĝis Nizo. kaj tiel forte batis ĝin ke povra Nizo falis morta surteron dum nia Merlo ekkriis``

– Ne, ni ne estu amikoj! Nizo nin trompis ĉar ĝi volis min por tagmanĝo sed nun ĝi fariĝas tagmanĝo por serpento. Jen, vidu kiel serpento ĝin glutas.

Dirinte tion Merlo flugis supren kaj profunden en arbaron kie ĝi daŭrigis ĝian kantadon.

Ĉiuj bestoj disiĝis fuĝe ĉiu en sia savodirekto.

Morala instruo: Ne kredu al via malamiko se vi estas survoje de ĝia intereso aŭ celo kiam tiam vi estos lia /ŝia kaptaĵo!

Miriĉ Jadranka –Zajeĉara Esperanto klubo – Serbio /JUNIO 2019

Ps. Senerarigita de mi AMIKAN
SALUTON de mi M.JADRANKaA



Somerfino

Somerfino

